

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 06/08/2020 Kvarcentnaŭdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **730,600** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **284,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **230,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **5,600** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro. 132



Ĉiu radiko baze apartenas al unu el la sekvantaj Vortkategorioj: Substantivo, Adjektivo, Agvorto (Verbo), Adverbo, Numeralo, Pronomo, Prepozicio, Konjunkcio, Subjunkcio, (kaj la Interjekcio se oni nomas ĝin radiko). Ĉiu radiko estas baze, origine, en unu el la kategorioj. Ĉar la kategoriaj finaĵoj estas memstaraj kaj povas kuniĝi kun iu ajn kategorio, oni ne estas certa ĉu iu Substantivo, Adjektivo, Verbo aŭ Adverbo origine apartenas al tiu kategorio. Sed la vortaro indikas tion havante post la vorto, interkrampe, unu el la literoj s, a, kaj v., (kaj adv.). En la parolata kaj en la skribita lingvo oni ne povas vidi tion, sed almenaŭ oni vidas en kiu kategorio iu vorto en certa loko estas uzata. Por ĉiuj vortoj oni do devas lerni la bazan kategorion, sed ili estas preskaŭ ĉiam la samaj en la etnaj lingvoj. Ekzemple "pren-" estas klare verbo kaj "grand-" estas klare adjektivo kaj "hom-" estas klare substantivo.

(daŭrigota).

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Roger Springer




VERKOJ



Esperanto estas ne nur *lingvo*
Esperanto estas *kulturo*

En Israelo aperis libere uzebla esperantlingva interreta biblioteko, kie esperantlingvaj verkoj senpage legeblas. Dum la lasta monato la plej ofte legata libro estis KOREIO, LA KONGRESLANDO, kies aŭtoro estas MARKUS Gabor el Hungario. La listo de la cent plej legataj verkoj troveblas en http://verkoj.com/php/plej_legataj.php

MARKUS Gabor



<https://www.facebook.com/groups/EoUSA/permalink/3228597203874935/?sfnsn=mo&d=n&vh=i>

Sendas Petro Danzer



Novaĵo sendata per Katja Steele

Ĵus estis lanĉita franclingva kurso pri Esperanto en la populara lingvolerna retejo Duolingo. Jam pli ol 2 400 personoj aliĝis al la kurso. Sume en la kvar diverslingvaj kursoj de Duolingo nun estas proksimume 730 000 aktivaj lernantoj de Esperanto."

Duolingo estas senpere atingebla per alklako al <https://www.duolingo.com>

Ĉi tiu grava novaĵo valoras ne nur por la franca kaj francparola movado, kiu ja urĝe bezonas renovigon – ĝi eĉ pli valoras por la signifa kvanto de afrikanoj, kiuj havas la francan inter sia abunda lingva arsenalo. Por ili, precipe en la nunaj pandemiaj tempoj,

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

gravas la milionoj da atingeblaj homoj. La Afrika Komisiono kaj la landaj asocioj en la okcidenta afriko devas ege eklabori laŭ ĉi tiu mirinda ebleco.

La Esperanta MENSA sojle de renaskiĝo

Mi estas dumviva membro de UEA kaj nun mi ekestas nova membro en Mensa. Pro tio mi decidis relanĉi la fakan asocion "Espermenso" kiu kunigu membrojn kaj de UEA kaj de Mensa. Por komenci mi kreis pli larĝan Fejsbukan grupon "Espermenso". Ĝi akceptas ankaŭ eks-membrojn aŭ estontajn membrojn de la du organizaĵoj. Kaj mi ĝojas konstati ke tio revigligas la lernadon de Esperanto ĉe pluraj Mensa-anoj.

<https://www.facebook.com/groups/743585999792126>

Bonvolu diskonigi al viaj geamikoj membroj de UEA kaj de Mensa, dankon.

Lingvokursoj tra la varbenda Azio

Estis kreita la Irana Kursaro 'Tibor Sekelj', kiu metas sian Zoom-konton je dispono de ĉiuj, kiuj volas instrui Esperanton en siaj lingvoj. Post unua sukcesa provo pri kurso de Esperanto en la taja sekvis aliaj kursoj, kiuj estas registritaj kaj rigardeblaj ankaŭ poste en <https://www.espero.ir/eo/kursaro/>. Se vi rigardas nun estas kursoj en la svahila, la araba kaj la kurda. Sekvis kursoj en la vjetnama, en la urdua kaj en la indonezia. Se vi volas realigi kurson pri Esperanto en via lingvo, skribu al [<kursaro.sekelj@gmail.com>](mailto:kursaro.sekelj@gmail.com).

Indonezio

Nova baza kurso pri Esperanto en la indonezia lingvo komenciĝis la 18-an de julio. Gvidas la kurson Ilia Dewi per la programo Zoom de la Irana Kursaro 'Tibor Sekelj'.

Pliaj informoj ĉe : asosiasiesperanto.iea@gmail.com kaj kursaro.sekelj@gmail.com

Vjetnamio

Nova senpaga kurso pri Esperanto en la vjetnama per la Zoom-sistemo de iranaj esperantistoj: instruas s-ino Julianna (el Hungarujo) kaj s-ro Hoang Ngoc Boi (Vjetnamio). Organizanto de la kurso: S-ino Tran Hoan.

Katja Steele



Sennacieca Asocio Tutmonda

Deklaracio

La 93-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazinte perinterrete de la 26-a ĝis la 31-a de julio 2020 :

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

▶ alvokas SAT-anojn kaj progresemajn fortojn jam nun ekserĉi la konkludojn tirendajn el la kronviroza krizo, cele forturni aktualajn danĝerojn : san-rilatajn, limigon de civitanaj kaj laboristaj rajtoj, pri informiĝo, k.t.p. ;

▶ solidaras kun homoj de la tuta mondo trafitaj de la pandemio, laŭdas kaj dankas sanlaboristojn kaj ĉiujn, kiuj ebligis daŭrigon de ĉiutaga vivo en la socio pro ilia nemalhavebla kaj senlaca laboro, kaj kondolencas al familioj, kiuj perdis siajn anojn pro la pandemio ;

▶ fronte al la oftigi de zoonozoj, konstatante, ke kapitalismo bezonas plialtigi la konsumon, inkluzive de bestoj, esperas, ke la homaro trovu ekvilibron kiel parto de la naturo, kio postulas drastan malaltiĝon de konsumado de bestodevenaj nutraĵoj ;

▶ konstatas, ke en la pandemio plej suferas la laborista klaso kaj la loĝantaro de malpli evoluintaj landoj, kaj postulas, ke por solvi la krizon pagu la kapitalista klaso, kiu en la lastaj jaroj akumulis enormajn riĉaĵojn ;

▶ plie postulas, ke laboristoj estu protektataj en sekuraj laborkondiĉoj por preventi pluan disvastiĝon de la kronviruso, kaj ke rifuĝintoj estu evakuitaj el tro dense loĝataj provizoraj kampadejoj ;

▶ alvokas al la Monda Organizo pri Sano, landaj registaroj, kaj sciencistoj kaj fakuloj de la tuta mondo pli aktive kunlabori por laŭeble rapide venki la pandemion ;

▶ apogas feminismon kaj la sociajn kaj politikajn movadojn, kiuj luktas por la rajtoj de virinoj kaj infaninoj, kiuj suferas ekspluatadon, malriĉecon kaj diskriminacion en la tuta mondo ;

▶ alvokas defendi disigon inter la ŝtato kaj la eklezioj en la tuta mondo ;

▶ alvokas defendi la liberecon de konscienco kontraŭ ĉiuj dogmoj en la tuta mondo ;

▶ kondamnas la faŝisman kaj nekompetentan reĝimon de Rodrigo Duterte, prezidento de Filipinoj, kaj subtenas la demokratian movadon en ĝia longdaŭra lukto en tiu lando ;

▶ subtenas la homrajtan movadon en Hongkongo kaj kontraŭas la novan leĝon pri nacia sekureco de Ĉinio, uzatan por silentigi kritikojn ;

▶ rilate la alproksimiĝantajn prezidantajn balotojn en Belorusio alvokas la aŭtoritatojn de tiu lando respekti la civitanan rajton de demokrata elekto sen persekutado de la opoziciuloj ;

▶ proponas, ke SAT aliĝu al la porpaca kampanjo de UEA – lige kun la jubileo de UN ;

▶ postulas, ke neniu ŝtato en la mondo tenu militajn garnizonojn en aliaj ŝtatoj aŭ intervenu en ili ;

▶ konstatis, ke 6 miloj da rifuĝintoj estas blokita ekde pluraj monatoj en greka insulo Samoso ; kaj alvokas eŭropajn respondeculojn, por ke ili rapide decidu akcepti tiujn rifuĝintojn en siaj landoj.

Sendis **Franciska Toubale**




KREDU NE KREDU



Jen demando: En kiu lando dek tri jarulo ne rajtas

a) labori, b) stiri aŭton, c) voĉdoni, d) labori en butiko, e) aĉeti bieron, f) aĉeti cigaredojn, g) aĉeti pikantajn gazetojn, h) aĉeti loteriajn biletojn, sed! tute rajtas aĉeti, posedi, kaj utiligi 22 kalibran pafilon?



Jes, vi prave divenis; nur en la lando de la liberaj uloj kaj la domo de la bravaj uloj. 🤔

Vera Payne

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)



L e ĝ a ĵ o j .

KIU KULPAS ?

Dekmiloj da aŭstralianoj suferas pro la koronaviruso. Post la komenco en Februaro centoj, se ne miloj, kaŭzis aŭ helpis tiun suferadon, ne zorgante ke ili evitu transdoni la viruson. Neniu, aŭ preskaŭ neniu, punatis nek punatos pro tiu nezorgemo. Kaj tamen ĉiu civitano leĝe devas helpi en ies malsaniĝo aŭ morto laŭ sia povo; neobeo de tiu leĝo estas krimo kaj punatas.

La registaro parte kulpas ne avertante pri la helpdevo, sed eĉ sen tio ĉiu civitano devas obei tiun leĝon pri deviga helpo. Ĝi estas tre bona, precipe en akcidentoj. En la kazo de la viruso, eniri Aŭstralion sen testati, estas manko de helpo, do krimo, eĉ se la registaro permesas tian eniron. Ne diferencas, ĉu tia persono estas aŭstraliano aŭ ne. Kaj efektive, ankaŭ la registaro kulpas pro permesi la eniradon.

Oni diras, ke la registaro havas la devon lasi eniri aŭstralianojn en la kazo de la viruso. Mi leĝe ne samopinias pri tio. Observu la jenan kazon. Granda meteoro falanta en la centron de Aŭstralio detruas la tutan landon. Pro tiu situacio aŭstralianoj kiuj hazarde estis en alia lando ne povas retroiri al Aŭstralio, nek devas. Ili vojaĝis al alia lando, kun siaj avantaĝoj, kaj devas akcepti ankaŭ ke en certaj cirkonstancoj ili devas akcepti malavantaĝojn, en ĉi tiu kazo la neeblo retroiri al sia lando. Same kiel ĉe la meteoratako, ankaŭ la viruso atako kreas la situacion ke ili devas resti en la fremda lando kiam okazas la atako de la viruso. Aŭstralio ja estas parte detruita, nome ĝia eblo zorgi ke la viruso ne ataku la civitanojn aŭ ke la vojaĝanto ne enirigu la viruson. Do ni morale kaj leĝe povas postuli ke aŭstralianoj ne retrovenu al sia lando, escepte se li aŭ ŝi testatas kaj metatas en kvarantinon. Se tiuj devoj estus post Februaro obeitaj, kaj se samtempe ankaŭ nevojaĝintaj aŭstralianoj kun la viruso estus metataj en kvarantinojn, ni havus nun nur frakcion de la nunaj viruskazoj, precipe en Melburno. Ke la registaroj ne faris sian drastan devon ne povas esti senkulpigo por onia manko de sia devo. Kaj kion ni konstatas? Ke multaj homoj ne obeas siajn devojn, kaj ke pluraj eĉ konscie kontraŭas la devojn. Konsekvence la registaro ne povas fidi ilin kaj tial nenium. Kaj dekoj da miloj da aŭstralianoj estas la viktimoj kaj la kulpuloj ne punatas.

Marcel Leereveld.

POR LINGVISTOJ .

Zamenhof kreis por ni la Fundament'an radikaron kaj kreis por la Esperantistoj la regulojn por fari el tiuj radikoj novajn vortojn per aglutina vortkunmetado, do sen uzi neologismojn. Li krome ne malpermesis, ke ni kreu neologismojn por lasi la Esperantistaron decidi ĉu fine uzi la neologismon aŭ el ekzistantaj radikoj kreitan novan vorton kiu aŭtomate estas oficiala, ĉar uzanta oficialajn elementojn. Li krome diris, ke li esperas kaj atendas, ke la Esperantistoj fine elektos la per Fundamentaj radikoj kreitan alternativon, kie tio estas ebla.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Kaj tio kelkfoje ne estas ebla aŭ ne rekomendinda. Ekzemple la vorto "postulo" el "post" kaj "ulo" (same kiel antaŭulo)) samus al la substantivo de la radiko "postul-", do oni preferas aŭ neologismon aŭ "malantaŭulo" aŭ "postvenulo". Kaj ne rekoneblas "dekulo" por "deka ulo". Nek "koncerto" por "la certeco koni".

Specialan problemon kreus la alikategoriado de la tabelvortoj. Malfacilaj estus iliaj substantivoj, kiel "tieso kaj tiao kaj tieo" kaj nenecesaj "tielo kaj tiomo kaj tiuo", ĉar Zamenhof jam kreis, el la eŭropaj lingvoj aliajn radikojn, kiaj maniero por tielo kaj kvanto por tiomo kaj loko por tieo, kaj kaŭzo kaj motivo por tialo. Sed ĉar Zamenhof kreis, nesaĝe, du malsamajn signifojn por la unu tabelvorto, oni trovis necesa krei unu vorton por la du signifoj kune, nome "tialo" por kune la du malsamaj signifoj "kaŭzo" kaj "motivo". Tio estas utila en ĉi tiu stranga situacio kie unu tabelvorto havas du malsamajn signifojn. Eŭropaj lingvoj ne havas tian unuecan vorton, do "tialo" povas signifi KAJ "cause" KAJ "reason".

La stranga vorto "ĉiesulino" hazarde estas ĝuste formita, ĉar "ies" havas adjektivan sencon kaj "iesa" persono estas persono apartenanta al iu. Sed la signifo ne estas ĝusta, ĉar prostituino ne estas persono kiu apartenas al ĉiuj.

Marcel Leereveld.



Estrarkunveno 2020-08-06

Venonta kunveno: jaŭdo 6-a de aŭgusto 2020.

Plej amike, Sandor Horvath



Dangera Mondo

(1) "Registaro diras, ke ĝi bezonas sekretecon por fari militon kontraŭ siaj malamikoj efike, kaj, kurioze, ju pli sekrete ni permesas ĝin, des pli multaj militoj kaj malamikoj ŝajnas esti."

(2) Kio estas nekredebla estas, ke nenie estas iu ajn pridubintan la logikon de vizado de vakcina disvolviĝo kiel "konkurencio." Neniu klarigas, kial esploristoj sekrete subtenas sian esploradojn, anstataŭ dividi ĝin kiel eble plej vaste. Oni ne diskutas pri tio, kiel tio konsistigas tute bizaran manieron kontraŭbatali tutmondan pandemion, kio ne devas esti "kunkurado por vidi, kiu lando povas trovi vakcinon unue, tiel ke ĝi povas devigi ĉiujn pagi se ili volas ŝpari la vivon de siaj loĝantoj." ... Ni havu iom da morala honesteco: La konkurenciva maniero estas malbona. Estas krime, ke iu ajn lando sekrete gardu informojn pri vakcinoj. Tio estas amasa murdo.



Roger Springer



3ZZZ Kiel jam anoncite, eblas aŭdi en la elsendo de la 3a de aŭgusto 2020 kiel la revuo *Monato* solvis siajn krizojn. Tion klarigas Paŭl Peeraerts. Ree estas montrita kiom grava estas la elekto de la vortoj, kio sin trudas malantaŭ la vortoj. Estas montrita ankaŭ la potenco de muziko kaj kantado.

FranciskaToubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE